

EKO 2023



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj



EKO 2023 / 45 Aŭgusto 2, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj (lingva kontrolo): Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Alk: 34 KB. Sume: 464 KB

Temas nur pri PDF, kiun SMG alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.

TEJO kun nova estraro

La Komitato de TEJO en Torino elektis la Estraron de TEJO por 2023-2024.

- **Prezidanto:** Tyron Surmon (Britio)
- **Vicprezidanto:** Snehaĝa Venkatesh (Barato)
- **Ĝenerala Sekretario:** KuboF Hromoslav (Slovakio)
- **Kasisto:** Patricio Agustín Iglesias (Argentino)
- **Estrarano:** Abhinav Varma (Barato)
- **Estrarano:** Ada Florence Iracadukunda (Burundo)

La nova Estraro ekoficos la 1an de septembro 2023. Fonto: La Ondo de Esperanto

<https://sezonoj.ru/2023/08/tejo-117/>



UEA sukcesas ĉe Erasmus+

Universala Esperanto-Asocio (UEA) anoncas la aljuĝon de administra subvencio per la programo Erasmus+. Tio kovras trijaran periodon, cele al plivastigo de la prioritatoj de la Asocio, kongrue kun la temoj de la programo Erasmus+. La projekton orientas ampleksa laborplano, kiu referencas al la laboroj de la Komitato dum la Montreala Universala Kongreso. La jaroj ricevas propran temon, por krei specifan fokuson direkton dum la projekto progresas:

- 2023: Jaro de daŭripova evoluo
- 2024: Jaro de interkultura kompetento
- 2025: Jaro de cifereca kompetento

La projekto fokusiĝas pri tiuj temaj aktoj por plifortigi la agadojn de UEA kaj krei sinergiojn kun iniciatoj landaj kaj lokaj. Por la jaro 2023, €140 000 estis aljuĝitaj, dum por postaj jaroj la sumo dependos de la agadraportoj kaj de la kvanto da dungitoj. Tiu ĉi sukceso kronas strategian agadon de UEA rilate al la programo Erasmus+, kiu komenciĝis en 2020. UEA ankaŭ kunordigas partneran projekton en

la kadro Erasmus+, pri daŭripova transporto, kun aparta fokuso al trajnoj kaj bicikloj, kunlabore kun sia faka asocio IFEF kaj kun la faka asocio de TEJO, BEMI.

SMG: Pri tio temas AMO 99 en Ĉeĥio, pri kio EKO 2023-18 jam raportis.

UEA partneras en pliaj projektoj: unu pri inkluziveco de blinduloj en Esperanto-agado, kunordigata de la Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj; unu pri interkultura kompetento, kunordigata de Itala Instituto de Esperanto; krome, tria projekto, kiu ĵus komenciĝis, temas pri subteno al rifuĝintoj el Ukrainio, kunordigata de Bjalistoka Esperanto-Societo. Ĉiu partnera projekto havas buĝeton je €60 000

UEA ĝojas pri aljuĝo de tiu ĉi grava subvencio; ĝi estas optimisma pri la sukceso kaj entuziasme rigardas al la estonteco por krei pli inkluzivan, interkulturan, kaj ciferecan movadon ene de sia tutmonda komunumo. Por pliaj informoj pri la projekto: vizitu nian retpaĝon ĉe www.uea.org.

Koncizigita el Gazetara Komunikado de UEA

ILEI aktiva en Jutubo

Jen du novaj videoj en la Jutuba kanalo de ILEI (Esperanto + Edukado ILEI). Temas pri la forumo pri Eduka Modernigo kun la parolado de Ahmad pri lingva justeco, nun kun Esperantaj kaj ĉinaj subtitoloj, kaj pri la sperto de juna samideanino Wei Ningna en la BEK-kurso de Dennis Keefe en Cullera, Hispanio, en Aprilo-Majo 2023. Bonan spektadon:

[Eduka Modernigo kaj Esperanto-Disvastigo / 世界语架起交流互鉴的桥梁](#)

[Wei Ningna: Esperanto-Plaĝo 2023](#)

Alessandra Madella,

UEA bezonas Randajn Asociojn!

Tiu konstato leviĝis en Eŭropo post la granda sukceso de la Danuba ret-grupo, kiu kunvenas ĉiumonate kaj entiras diskutantojn el deko da landoj kaj simila nombro da lingvoj. La temaro plej ofte temas pri kursoj kaj instruado, sed povas temi ankaŭ pri informado. Per tia aliro, kunvenigante la homojn, kiuj randas al granda rivero, ni aŭtomate forprenas la emon kaj eĉ la eblon de krokodilado. Tio certe ne validas por la plimulto de la Landaj Asocioj. La laborlingvo de randaj ret-grupoj devige estas Esperanto. La diskutoj permesas la interŝanĝon de spertoj trans naciaj limoj, tiel ke imitindaj projektoj povas transiri landlimojn.

Nia evoluigo de la Eŭropa projekto sekvas sugeston, kiun proponis la anoj de la centa seminario de AMO (Aktivula Maturigo): ni proponu al la esperantistoj en Svislando, Germanio, Francio kaj Nederlando la fondon de simila ret-grupo. Ret-grupo ja flekseblas, ne necesas formuli Statuton kaj Regularojn, sidejo ne necesas, propra kongreso ne necesas (sed ja eblas!). Por randa ret-grupo sufiĉas aliro al Zoom aŭ simila komunikilo.

La randa aŭ rivera solvo malpli aplikeblas al Ameriko. La Misisipi-



Misuro fluas preter samlingvanoj, Amazono ligas nur du lingvojn, iom similajn. Same pri Kanado, kie regas du lingvoj. Azio pli produktivas riverege; Mekong fluas tra multlingva regiono, kiu urĝe bezonas movadan fortigon. Ganĝo simile. Afriko havas la Nilon (bluan kaj blankan) kaj Zambezan riveregon, kaj krome lagon Viktorio, kies randoj karesas la bordojn de Kenjo, Ugando, Tanzanio, Ruando kaj Burundo. Sed Afriko ja havas aktivan Afrikan Komisionon, kaj eble tio sufiĉas.

SMG, kun espero pri subteno de Aurora Bute de UEA.

UMEA aldonas la danan

Pretiĝis la dana-esperanta-ukraina versio de la tri-lingva, medicina interpretisto / tradukhelpilo. **Dankegon al S-ro Peter Weide, kiu zorgeme tradukis la tekston en la danan lingvon.** Jam aperis la aldonita PDF-versio sur la retejo de UMEA:

<http://umea.fontoj.net/projektoj>

Ekde nun ĉiu dana medicinisto, kiu elŝutas la ĝis nun pretiĝintajn 5 tri-lingvajn versiojn, kaj posedas la eminentan libron **Ärztlicher Dolmetscher de D-ro Gert Hoyer kaj D-rino Uta Hoyer** povas pridemandi la anamnezon / medicinhistorion de siaj eksterlandaj pacientoj, kaj informi ilin pri la diagnozaj kaj terapiaj rimedoj en **23 lingvoj. Ĉio ĉi povas savi vivon.** La libro estas aĉetebla, elŝutebla:

<https://link.springer.com/book/10.1007/978-3-662-48739-6>

Scienco en la UK

Temas pri la naŭ IKU-prelegoj (el kiuj 3 havos daŭrigan AIS-prelegon), 10 prelegoj de la Scienca Kafejo (okazontaj en du sesioj de po kvin prelegoj), la Scienca Forumo vendrede, kaj la Faka Forumo merkrede. La plena programo videblas rete ĉe <https://uk.esperanto.net/2023/programo>, kaj la sciencaj programeroj havas apartan koloron por pli facila orientiĝo.

La IKU-prelegoj estas: IKU-1 (Jacobsen) kaj IKU-2 (Goes), IKU-3 (Labrie) kaj IKU-4 (Wandel), IKU-5 (Tonkin) IKU-6 (Barandovská-Frank) IKU-7 (Goodall) IKU-8 (So Gilsu) kaj IKU-9 (Pennacchietti). La Scienca Forumo (resumo de la tuta IKU-sesio) okazos vendrede. La Esperantologia Konferenco (ĵaŭde kaj vendrede) estos laŭplane spektebla kaj surloke kaj defore.

Komento SMG: Kun tiom da sciencistoj en unu loko, devas eble diskuti kaj plani la reaktivigon de la scienca Asocio ISAE, la sola aliĝinta faka asocio de UEA kiu de jaroj ne aktivis (krom mallonga periodo en 2018-19). Temis pri nur du unuopuloj, kiuj ege agis redonante enhavon al la retejo de ISAE. Sed ili estis soluloj, kiuj en enorma manko de solidareco de aliaj sciencaj agantoj, seniluziigis kaj elbruliĝis.

Defio SMG: Kun tiom da scienco en la UK en Torino, venu al la tagordo konkretaj paŝoj por restarigo de ISAE. Ke ĝi dormas tra pli ol jardeko post tiom brila komenca periodo estas honto por UEA. En Torino vi decidu pri provizora estraro, nomi prizorganton por la retejo kun klara plano pri revivigo de tiu esenca faka asocio.

Ĉina muzeo kaj biblioteko kun planoj

Instruisto Semio parolas pri Zaozhuang-Universitato en Ĉinio (kie estas Esperanto-Muzeo kaj Eo-fako) kaj pri siaj planoj por la estonto.

<https://esperanto.cri.cn/2023/07/12/ARTIVueEGYDFqq7aMqnSZsTk230711.shtml>

Forumo de CRI mencias Esperanton

Jen mallonga artikolo pri la forumo en Ĉina Radio (ne verkita de mi):

<https://esperanto.cri.cn/2023/07/21/ARTI8XQ5JFzUTxGkAxcKO4IJ230721.shtml>

Sendis ambaŭ ligojn Alessandra Madella

Kurso je nivelo B1 en Ĉinio

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Ĉina B1 kurso

Gvidantonomo: Liru CHEN

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Pintung, Ĉinio.

Aldoninto: DANlejuro

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27542>

Ondo 1300

Dum 1300 tagoj, ekde la 1-a de januaro 2020 ĝis la 23-a de julio 2023, en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto. Konatiĝu pli detale kun la statistiko de ĉi tiu novaĵretejo kaj pripensu, kiel vi povas subteni ĝin <https://sezonoj.ru/2023/07/ondo-115/>

Landnomoj kaj iliaj ISO-normaj landkodoj

Ni alkroĉas la liston de landoj de la mondo kun la kodoj, kiujn ni offer uzas en EKO,

Arda peto por pli orda livero de tekstoj por EKO

- Tekstoj estu kontrolitaj fakte kaj lingve.
- Tekstoj estu prefere en longo de 400 ĝis 800 vortoj.
- Tekstoj pri programoj, kiuj povos ŝanĝiĝi, aperu en retejo, kiu ĉiam aperigas la lastan version; al tiuj ĉiam aldonu la daton de lasta ĝisdatigo.
- Kaze de eraraj informoj, bv. informi ankaŭ la verkinton rekte.
- Memoru, ke EKO havas internacian publikon. La tekstoj estu internaciaj.

===== Vortoj: 1540 =====

La kolekto de EKO: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 42).



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikoj estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunajo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedistoj. Pri petoj pri forfaligo el la ricevantoj. Tio facilas por la grupoj kun unuopaj adresoj: Landaj kaj Fakaj Asocioj, la Gazetaro, ricevantoj el AMO-seminarioj 20-72. Aliaj ricevantoj ricevas la komunikojn pere de ret-grupoj, pri kies enhavo EKO havas neniun influon.